INFORMILO

DE

Esperanto-Rondeto

DE

TORQUATO SEVERO

Vila Torquato Severo

(D. Pedrito)

ESTADO DO RIO GRANDE DO SUL — BRASIL

Minerva — Bagé

I N F O R M I L O D E E S P E R A N T O - R O N D E T O

- D E -

T O R Q U A T O S E V E R O

JANEIRO ANO III
1946 - Vila Torquato Severo (D.Pedrito), Rio Gr. do Sul - Brasil.- Nº I

La verda standardo

En Esperantujo regas ne sole la lingvo Esperanto, sed ankaŭ la interna ideo de la esperantismo; en Esperantujo regas ne sole la oficiala ĝenerala esperantismo, - tie regas ankaŭ io alia, io ĝis nun ankoraŭ ne precize formulita sed tre bone sentata de ĉiuj esperantujanoj -tie regas la v e r d a s t a n d a r d o !

Kio estas la verda standardo ? S e por ia komercisto, kiu uzas Esperanton nur por vendi siajn komercaĵojn aŭ por iu sportisto, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝi, nia standardo estas simpla signo de nia lingvo, simpla interkonsentita dekoracio por niaj kongresoj kaj institucioj - ni, esperantistoj-batalantoj, certe vidas en nia standardo ion alian: ĝi estas por nia io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado, ĝi estas la voĉo, kiu konstante memorigas al ni, ke ni laboras por Esperanto nur tial, ĉar ni esperas, ke pli aŭ malpli frue, eble post multaj jarcentoj,

Sur neŭtrala lingva fundamento
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Ni konstante ripetadas, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la internan vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei lingvan ponton inter la gentoj. La devizo de la ideaj esperantistoj, neniam ĝis nun precize formulita, sed ĉiam klare sentata, estas: "Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn".

Tia, laŭ mia opinio, estas la devizo de la verda standardo, de tiu bela kaj majesta standardo, kiu kunvokas nin ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo en la nomo de la plej bela revo de la homaro

Kongresparolado
de D-ro Zamenhof.
(Kembriĝo 1907a).

N I A I N F O R M I L O

Nia bulteno hodiaŭ aperas envolvita en simpla kovrilo. Kiel vi vidas, ĝi mankoraŭ estas tre modesta, sed vi certe konsentas, ke ne la ekstera formo de bulteno estas pelgrava, sed la enhavo kaj la spirito per kiu ĝi estas skribita kaj...legata. Nun ĝi estas farata maŝinskribe, sed baldaŭ ni ĝin faros per multobligilo. Hodiaŭ ni provas la unuajn paŝojn en nova formo. Se ili sukcesas, ni ne hezitos marŝi pli firme. La sukceso dependas de niaj geamikoj kaj geanoj. Per tiu ĉi bulteno ni ne volas nur informi vin pri okazintaj aŭ okazontaj faktoj kaj laboroj, ĉu en la estraro de nia rondo, ĉu en la movado en nia Lando, sed ni petas vin, ke vi uzu ankaŭ la spacon por viaj komunikoj kaj proponoj. Iom post iom ni deziras rezervi parton de nia informilo por brazilaj agemuloj. Ĉi tiun numeron de nia informilo ni dissendas al ĉiuj ni konataj adresoj de aktivaj esperantistoj laŭ la nomaro, kiun nia sekretario aranĝis antaŭ du monatoj. Fine, ni kore salutas niajn samlandanajn kaj alilandajn geamikojn.

" Só dois idomas devemos falar: o da Pátria e o da Humanidade - português e esperanto. Nenhum dos outros nos pertence." - I. G. B.

Esperanto-Rondeto de Torquato Severo fondita la 20an de Septembro de 1941a kaj aliĝinta al Brazila Ligo Esperantista.

KORAJN BONDEZIROJN
POR 1946 NI DEZIRAS AL VI.

D O N A C O

De amiko ni ricevis kelke da ekz-oj de la ĵus eldonita verketo "Enkonduko en la studadon de la Spiritisma Doktrino", kondiĉe ke senpage ni dissendu ilin al niaj geamikoj eksterlande, laŭ peto. Tiel ke, tiuj ekz.oj de nun estos je dispono de alilandanaj geamikoj, kiuj sendos al ni siajn adresojn. "La esperanta eldono de tiu ĉi verketo moderna, bele presita sur bona papero, zorge preparita de eminenta Lingvo-Komtatano kaj ankaŭ kiel literaturo ĝi havas grandan signifon por la lingvo." Kiel vi vidas, ĝi certe vin interesos.

Petu vian senkostan ekz.on al Esperanto-Rondeto de T. Severo, Vila Torquato Severo(D. Pedrito), Rio Grande do Sul, Brazilo.

Skribante, bonvolu indiki vian adreson preslitere kaj tuje ni ekspedos la libreton al vi. Tiu informo eble servos aliaj interesuloj fremdolande.

V E R S O J

La vivo estas bela,
se lumas stelo hela:
dum tago varma suno,
dum nokto milda luno.

Kaj kio estas suno
kaj luno por la tero,
por nia koro estas
la amo kaj espero.

F.V.L.

Salmo soy, salterio soy
que vibra en el universo,
vengo del sol y el sol voy,
soy el amor ! soy el verso !

José Marti(poeta cubano)

Quem canta seu mal espanta
Diz um ditado profundo.
Há tanta gente que canta
E há tanta mágua no mundo !

Mário Totta, brazila.

K R I S T N A S K - A R B O

Nia rondo aranĝis kristnask-arbon por siaj anoj.

Estis prezentita la jena programo:

1) Salutparolado de la prezidenteco.
2) Komuna kantado de "Kristnaska himno"
3) Reĝoj el Oriento, deklamo.
4) S-ro Pankraco kaj Sr-ino Terezo, ŝerca dialogo.
5) Kristnaska anĝelo, deklamo.
6) "Lasu la infanojn veni al mi!..., deklamo.

La vespero finiĝis per preĝo elparolita de nia sekretario petante la benon de Dio al la tuta homaro.

Oni disdonis dolĉaĵojn kaj ludilojn al alestantaj geinfanoj.

N I A E S T R A R O

Jen la nuna estraro de nia rondo:
Prezidanto: Edú Severo;
Viv-prezidanto: Carlos S. Pereira;
Sekretario: Paulo G. Neto;
Kasisto: P. Severo; kaj
Bibliotekisto, O. Severo.

La delegito de IEL kaj BLE estas d-ro João Severo.

La delegiteco funkcias ĉe nia sidejo, ankaŭ FD pri Spiritismo.

RÁDIO INCONFIDÊNCIA -PRI-3.

Per mallongaj ondonj disradias ĉiusabate Esperante de la 17a ĝis la 17a kaj duono (frekvenco: 6.000 kil.-ondo 49 metrojn) por propagandi la brazilan vivon eksterlande. Aŭdu la programon kaj sendu al " Rádio Inconfidência - Praça Rio Branco, Belo Horizonte, Minas Gerais", viajn impresojn kaj sguestojn por ĝia plibonigo, tion petas nia sindona samideano d-ro Wilson Veado.

Nossa sala de leitura e Biblioteca continuam à disposição de todos, diariamente, depois das 15 horas, excepto aos domingos.

Li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston.

D-ro Zamenhof.

Convidamos nossos sócios e demais interessados para nossas reuniões de estudo e aperfeiçoamento da língua Esperanto, terças-feiras, às 20 horas.

A L V O K O

Tre estimataj geanoj. Korajn bondezirojn por 1946 ! Per tiu ĉi numero de nia informilo, la estraro de "Esperanto-Rondeto de Torquato Severo" frate sendas tiun ĉi alvoko al vi. En 1946a nia klubeto atingos la kvinan jaron de sia ekzisto. Ni deziras pligrandigi nian planon por la disvastigado de Esperanto en tiu ĉi distrikto kaj en aliaj limnajbaraj komunumoj. Ni konstatas, ke nune ni havas 21 anojn. Tiu ĉi estus tre ĝojiga rezulto, se ĉiu ano farus sian devon. Bedaŭrinde el la membroj pagis nur 10 ! Ni ne scias la kialon, sed tiamaniere ni ne povas progresi nek efike labori. Estas necese ke ĉiuj sciu: ni bezonas ricevi la antaŭviditajn enspezojn, por ke ni povu plenumi niajn devojn. Ni neniun devigis aliĝi, sed kiu aliĝis tiu plenumu sian devon. Kiel ni jam diris, ni havas multajn planojn por 1946a. Unu el ili estas havigi al nia grupo aparaton por multobligi niajn monatajn cirkulerojn, niajn bultenojn kaj aliajn propagandilojn, kiuj ĝis la momento estas preparataj maŝinskribe. Post malmultaj semajnoj ni esperas fini la negocon pri la citita multobligilo. Tial ni insiste petas la estimatajn geanojn, ke ili tuj pagu la kotizon por 1946. Pardonitaj jam estis viaj ŝuldoj el 1945a. Ni profitas la okazon por memorigi vin, ke se vi ĉiuj pagus siajn kotizojn, vi bone povus aliĝi al BLE kaj IEL vi profitus la premiojn kaj aliajn bonaĵojn, kiuj ili disdonas al siajn membrojn. Pripensu pri tio, estimataj geanoj ! Esperantitojn tie ĉi oni devas, kiel Diogeno, serĉi per lanterno ! Sed tiuj, kiuj logas en nia urbeto povus konscie kaj entuziasmpine apogi nian rondon. Ĉu ne ? Venu al ni kaj aliĝu al niaj Ligoj! Unueco estas forta! Ni ekcitas ĉiujn ĉi-tieajn esperantistoj aliĝu al nia rondo kaj helpi en disvolvo kaj perfektigo. Petu ankaŭ viajn amikojn fari tion; Ĉu vi ne scias, ke multaj riveretoj kreas potencan riveron ?! Ankaŭ vi ja deziras, ke nia movado en tiu ĉi regiono baldaŭ fariĝu granda kaj vigla ! Do eklaboru kun ni!! Fine ni atendas vian apogilon kaj frate premas vian manon. Tute via.-La estraro de Esperanto-Rondeto de T.Severo, janeiro de 1946a.

ZAMENHOFA TAGO

Memorigante la 86an naskiĝ-datrevenon de nia neforgesema Majstro D-ro zamenhof, okazigis nia rondo, je la 15a de la pasinta monato, ĉe nia sidejo ĝeneralan kaj publikan kunvenon, dum kiu oni deklamis poeziaĵojn kaj kantis la esperantan himnon. La prezidanto de la grupo faris prelegon pri la vivo kaj la verko de la Majstro. Paroladis ankaŭ d-ro João Severo, delegito de IEL. ĉeestis niaj estraranoj kaj diversaj anoj de la grupo. Ankaŭ krome tiuj ĉeestis pli da 16 personoj, iuj montrante simpatian al Esperanto, aliaj nur scivolemaj.

-oooOoo-

" N I A T E R O "

Nia samideano s-ro D. Peereboom, el Nederlando, atentigas nin pri la baldaŭa eldono de la kultura revuo nomata "Nia Tero", pri la tuta mondo.

"Nia Tero" deziras esti populara revuo, kiu alportas ĉion sciinda al siaj legantoj.

La abonprezo estas fiksita je unu dolaro po duonon jaron. Skribu al li, en Echten, 21, Friesland.

P R I L A M O V A D O

La estraro de nia rondo profitante la komplezemon de la direktoj de la jenaj ĵurnaloj: "Ponche Verde", el D. Pedrito; "Reação", el Bajé; kaj "O Dia", el S. Gabriel, daŭrigas publikigante notojn, kursojn kaj sciigojn pri Esperanto.

-oooOoo-

BONDEZIROJ

Alportante al ni bondezirojn pri la Novjaro 1946a ni plezure ricevis tre ĝentilajn poŝtkartojn de la jenaj samideanoj: Prof. Ismael Gomes Braga, Prof Lauro J. Costa, Grupo esperantista "Francisco Valdomiro Lorenz", Arlindo Castor de Lima, kaj F. Doblas Filho. Ni dankas kaj reciprokas la bondzirojn por 1946a.

Samideano!! Aliĝu al BLE kaj al IEL . Unueco estas forto !! Izolita esperantisto faras por nia celo tiom, kiom se li ne estus Esperantisto. Li devas esti ano de iu ajn Esperanta Societo.

E L L A S P I R I T A M O N D O

KIAM MI EKKREDIS

Kiam mi ekkredis je postmorta vivo,
malfermiĝis al mi de Saĝec' l'arkivo;
ĉie en la mondo vidis mi la celon,
ekkoninte ĉie bonon mi kaj belon.

Se l'belec'perdiĝas fmrg frue sur la tero,
daŭras ĝi eterne en l'astral-etero;
se malsan'la korpon ĵetas sur la liton,
sano akompanas ĉiam la spiriton.

Amo de du koroj estas bela sorto;
ĝin, se ĝi fidela, ne disbatos morto.
Estas bele studi veron sur la tero,
kaj l'anim'postmorte vivos en la vero.

Tiel mi ekkonis kun agrabla ĝojo,
kiam min kondukis de la kred'la vojo.
Mi ekvidis l'altan fonton de la Bono,
kiu lavas pekojn per lia Am'kaj Kono.

Vera kred' dspelas de nekred' la nubojn,
ĝi racie solvas de la mens' la dubojn;
per la faktoj montras ĝi spirit-realon,
kaj ĝi priklarigas sorton kaj fatalon.

24-1-1945. ABEL GOMES.
(Laŭ ditado skribis mediume F.V.Lorenz).
-El "Reformador", monata bulteno de "Federação Espírita Brasileira",AV.Passos, 30 - Rio de Janeiro.

R I Ĉ E V I T A Ĵ O J

(Gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj)

SANTA CATARINA -"NIA BULTENO",niĝ ricevis la unuan viziton de tiu ĉi bulteno, organo de Esperanto Klubo de Florianopolis. Nia kolego de Sankta Katerino estas bone preparita je la servo de la disvastigado de nia kara idealo. En tiu ĉi linioj ni sendas al niaj Florianopolaj geamikoj nian koran saluton kaj deziron de plej bona florado kaj sukcesoj.

RIO DE JANEIRO - Alvenis al ni, nia tre ŝatata kaj respektinda avo, Brasil Esperantista, organo de Brazila Ligo Esperantista.

PERNAMBUCO - Pernambuco Esperantista, lerta orno de laAsocio Pernambucana de Esperanto, el Recife.

S. PAULO - RAPORTO Nº 1 prezentita de la estaro de S. Paulo Esperanta Klubo al la ĝenerala kunveno je 24 de nov.de 1945.-

LA BIBLIO EN ESPERANTO

Prof. Carlo Bourlet, en unu el siaj famaj "Babiladoj" aperintaj en "La Revuo", diris ke la verkoj de D-ro Zamenhof estas veraj mirindaĵoj. Tamen nek Bourlet nek Zamenhof mem vidis la plej mirindan verkon de nia Majstro, ĉar ili ambaŭ mortis antaŭ ol la apero de "La Sankta Biblio" en Esperanto.

Tiuj mil paĝoj en neriproĉebla stilo, zorge presitaj en densa kompostaĵo, estas eterna monumento por montri en estontaj jarcentoj la geniecon de nia Majstro.

Pri la graveco de la fama religia verko, D-ro Zamenhof mem skribis:"Kian ajn vidpunkton ĉiu el ni aparte havas pri aferoj religiaj, neniu(eĉ plej granda malamiko de ĉia religio) povas nei, ke el la tuta ĝisnuna literaturo de la homaro la plej grava verko sendube estas la Biblio..."

Certe la Biblio fariĝis fundamento de nia tuta okcidenta literaturo. Ĝia doktrino estis la bazo de nia civilizacio, de nia civila leĝaro; tial eĉ la plej obstina ateisto devas ricevi ĉiutage, en sia socia vivado, influon de la malnova Sankta Libro, ĉar li devas obei la tradiciojn kaj leĝojn de sia Patrujo.

Al nia lingvo kaj ideo sendube la bonega eldono de la Biblio en Esperanto estos por ĉiam fonto de vivo kaj prospero. Ĉiu vere serioza esperantisto nepre studadas zorge ĉiujn verkojn de D-ro Zamenhof, kaj la Biblio estas la plej studinda verko de nia Majstro. Ĝi estas la sola grava libro de la Esperanta literaturo egale vendata de neesperantistoj en ĉiuj landoj de la mondo, dank' al lo organizo de la Biblia Societo. En Brazilo, ne nur la Biblia Societo regule disvendas tiun monumentan verkon, ankaŭ la "Federação Espirita Brasileira" ĝin distribuadas tra la tuta lando je la sama prezo de la eldonista socito.

Ĝi estas riĉa trezoro eĉ se ni rigardas ĝin el vidpunkto pure lingva ! - I-G-B.

La nekonata de hieraŭ fariĝas la vero de morgaŭ. - Camille Flammarion.

"Ne ekzista fakto sen kaŭzo".

Al

Liga Esperantista Brasileira

Praça da Republica 54 - 2 olr.

Rio de Janeiro